




---



# LA DEKSEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

---

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**  
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc, — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.  
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :  
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

---

## GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII<sup>e</sup> Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,  
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.  
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

---

### Nos Diners mensuels.

Les prochains Diners mensuels du Groupe auront lieu  
les Mercredis 2 Avril et 7 Mai 1913, à 8 heures très  
précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.  
Prix : 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris).

---

### Prochaines Réunions.

- 2 Avril. — Monata vespermango sekvata de esper. ludoj.
- 9 Avril. — S-ro Echard : Literaturaĵo.
- 16 Avril. — S-ro Jacques Camescasse : Pri kunedukado.
- 23 Avril. — S-ro Romano : Impresoj de piediranto tra Eŭropo.
- 30 Avril. — S-ro Georges Grosset : Pri ŝufabrikado (lumbildoj).
- 7 Mai. — Monata vespermango sekvata de esper. ludoj.

## RÉUNION MENSUELLE DES GROUPES PARISIENS

---

Les membres du « Grupo Fundamentista *La Dek-Sepa* » sont cordialement invités à assister à la réunion mensuelle des Groupes Espérantistes Parisiens, réunion qui aura lieu le 15 Avril 1913, à la Brasserie de Valois, 9, rue de Valois, Paris, à 9 heures du soir.

*Le Secrétaire :* ROBERT BOLLACK.

---

## COMMUNICATIONS

---

*Nous avons reçu les deux avis suivants que nous nous faisons plaisir d'insérer.*

### **Congrès de la Fédération Espérantiste de Bourgogne et Jura.**

Ce Congrès aura lieu à *Auxerre*, les 11 et 12 Mai prochain (Pentecôte).

*Dimanche 11 Mai.* — Visite de la ville. — Déjeuner (3 fr. 50) à midi 30. — L'après-midi réunion des délégués de la Fédération et réunion de U. E. A. — Le soir : Concert et bal au Casino Auxerrois.

*Lundi 12 Mai.* — Excursion aux grottes d'Arcy-sur-Cure et à l'église de Vezelay (monument historique).

Nous rappelons que la Compagnie du P. L. M. accorde des réductions aux membres de Sociétés voyageant en groupe.

Pour renseignements complémentaires s'adresser au président du Groupe Espérantiste : M. L. Cestre, 10, rue Faidherbe, Auxerre.

---

### **Congrès national Britannique Espérantiste (B. E. A.).**

Le 6<sup>e</sup> Congrès Espérantiste Britannique aura lieu dans la charmante station balnéaire d'*Eastbourne* pendant la Pentecôte (11 et 12 Mai 1913). Le Groupe Espérantiste et le Conseil Municipal d'*Eastbourne* seraient très contents de re-

cevoir des Espérantistes français. Cela aiderait leur propagande espérantiste et resserrerait les liens entre les deux pays.

La ville a édité des guides spéciaux illustrés en français : on peut se les procurer en écrivant à M. Nix, 2, Terminus Road, Eastbourne. Pour faciliter le voyage, une caravane partira de Paris, le samedi 10 Mai, à 21 heures, via Dieppe-Newhaven : on pourra revenir le lundi ou un autre jour, les billets sont valables 15 jours.

Les dépenses seront :

|   |             |  |
|---|-------------|--|
| Voyage en 2 <sup>e</sup> classe, <i>aller et retour</i> . . . . .         | fr. 37,80   |  |
| Carte du Congrès . . . . .  | fr. 3,10    |  |
| Logement et nourriture <i>par jour</i> : 1 <sup>re</sup> série, fr. 13,10 | } au choix. |  |
| 2 <sup>e</sup> » fr. 9,35   |             |  |

Ce voyage sera très intéressant ; et il sera agréable surtout aux nouveaux Espérantistes d'essayer la pratique de notre langue et d'éprouver la douce sensation de l'Espérantisme.

\* \* \*

Espérantistes qui désirez plus de renseignements, adressez vous sans tarder (pour seconder les efforts du Comité) à M. Souchay, 134, boulevard Exelmans, Paris.



## Muzikeldonejo A. BESNARD

26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.  
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj, violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.

Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

**SENSACIA NOVAĴO !!! ESPERANTAJ DISKOJ !!!**

|        |   |                     |                |
|--------|---|---------------------|----------------|
| KANTOJ | } | La Espero . . . . . | L. L. ZAMENHOF |
|        |   | Al vi . . . . .     | BEMBERG        |

|          |   |                              |                |
|----------|---|------------------------------|----------------|
| DEKLAMOJ | } | Preĝo sub la verda standardo | L. L. ZAMENHOF |
|          |   | Blanka vualo . . . . .       | V. DEVJATNIN   |

Ĉiu duobla disko : 4 fr. (1,600 Sm.)

Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.

# Le Congrès national Espérantiste français

A TOULOUSE

---

Notre Congrès national, disons-le sincèrement, fut très réussi. L'organisation était remarquable et tous les congressistes conserveront le plus agréable souvenir des 2 journées de Pâques passées à Toulouse.

Le Samedi après-midi, les congressistes furent reçus au Capitole (Hôtel de Ville de Toulouse) par le Conseil Municipal. Le soir, notre ami, le Professeur Cart, a eu le plus vif succès : sa conférence « L'Esperanto et la vie moderne » a conquis l'auditoire, et nous espérons que le Groupe de Toulouse recrutera dans quelques jours de nombreux membres nouveaux.

Le dimanche matin, la Fédération Espérantiste du Sud-Ouest tenait son Assemblée annuelle et le spectateur put constater le bon ton de la discussion en même temps que le sérieux avec lequel les plus graves questions furent envisagées. Cette Assemblée décida de soutenir devant la S. F. P. E. l'augmentation de la cotisation et de tenir son Assemblée de 1914 à Paris, pendant le 10<sup>e</sup> Congrès International d'Esperanto.

Le dimanche après-midi s'ouvrit notre Congrès national. L'Assemblée ordinaire comportait la lecture des rapports des trois Commissions (propagande, enseignement, presse). Beaucoup d'observations intéressantes furent présentées par les délégués à la suite de ces rapports. L'Assemblée générale extraordinaire décida :

- 1<sup>o</sup> De rechercher les moyens de fortifier financièrement notre S. F. P. E. et de consulter à ce sujet tous les Groupes affiliés ;
- 2<sup>o</sup> De demander à chaque Groupe d'abonner son président ou son secrétaire au journal officiel de la Société *La Movado* ;
- 3<sup>o</sup> L'adoption de la proposition de la Fédération de Bourgogne et Jura au sujet de l'élection des délégués. Dorénavant, ceux-ci seront nommés par les Groupes et non par les Fédérations. Cette décision modifie l'Article 9 des Statuts.

Il fut procédé à l'élection des membres du Comité.  
Voici le résultat des élections :

Sont élus : MM. Rollet de l'Isle (Paris), 6847 voix ; Durieux (Lille), 6136 v. ; Boirac (Dijon), 6055 v. ; Bourlet (Paris), 5511 v. ; Meyer (La Rochelle), 4493 v. ; Cart (Paris), 4483 v. ; Rousseau (Levallois-Perret), 4200 v. ; Evrot (Chambéry), 3946 v. ; Archdeacon (Paris), 3855 v. ; Demarcy (Beauvais), 3771 v. ; Cotton (Paris), 3620 v. ; Robert (Paris), 3463 v.

Viennent ensuite : MM. Bricard (Paris), 3291 v. ; de Coppet (Paris), 3071 v. ; Esselin (Bourges) 3047 v. ; Mlle Gérard (Paris), 2790 v. ; MM. Verax (Paris), 2733 v. ; Borson (Amiens), 2551 v. ; de Ménil (Paris), 2204 v. ; Rigoir (Marseille), 2175 v. ; Cohendy (Lyon), 1987 v. ; Duris (Limoges), 1636 v.

Le dimanche soir eut lieu un banquet sous la présidence d'un Conseiller Municipal de Toulouse. Un concert et un bal terminèrent cette joyeuse journée dont tout le monde fut satisfait.

Notons la présence de Samideanoj étrangers : MM. Sabadell (Barcelone) et Keleti (Szászsebes, Hongrie).

Pour clôturer ce Congrès, une excursion à Carcassonne eut lieu le lundi. Félicitons sincèrement l'organisateur du Congrès, le dévoué M. L. Beaumel, secrétaire du Groupe Espérantiste de Toulouse.

*Robert Bollack.*

---

KONTRAŬ  
M A R -  
M A L -  
S A N O

**DELPHININE**

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ  
F E R V O J -  
M A L -  
S A N E T O

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la botoleto : 10 fr. (4 S).

Ĉetebta ĉe S-ro **WBITZ**, 8, Rue de Duras, Paris  
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

## L'Esperanto à Paris et en Banlieue.

---

La « Zamenhofa Artista Adeptaro » organise une Soirée théâtrale et musicale le Samedi 17 Mai 1913, Brasserie de Valois, 9, rue de Valois, Paris. (S'adresser à M. H. van Etten, 10, Vivienne, Paris.)



Le Groupe Espérantiste Fundamentiste Paris-Est donnera sa première fête de propagande le Vendredi 4 Avril 1913. (S'adresser à M. Fernand Blangarin, 115, rue Manin, Paris.)



La Société Industrielle et Commerciale Espérantiste de France (S. I. C. E. F.), dans son Assemblée du 17 Mars 1913, a élargi ses statuts. Pour tous renseignements et les adhésions s'adresser au Président de la Société, M. Arnoult, 18, avenue Philippe-Auguste, Paris.



Nous apprenons la reconstitution de la Fédération Française des Jeunes Espérantistes, société qui avait existé il y a trois ans.



## LA VERA TIZANO DE L'ASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al  
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

## MALGRAVA OKAZINTAĴO

### EL LA VIVO DE MULTATULI

---

Ian sabaton, kun mia frato, kiu malfeliĉe ne plu vivas, mi promenadis sur la Alta Kluzo en Amsterdam. Mi tre bone memoras, ke estis sabato, pro la nombro de hebreaj promenantoj. Antaŭ ni kuris du hebreaj infanoj, knabo kaj knabino. La vento estis forta kaj la knabino, kiu verŝajne devis prizorgi la frateton, konsilis, ke li bone tenu sian ĉapeton. Mi sufiĉe bone memoras ĉiujn detalojn; ĝi estis ĉapeto velura kun bordo el skota kvadratenhava ŝtofo. La ĉapeto forblovigis kaj rulis trans la ŝtonoj, ĝis kiam la vento forblovis ĝin en la malaltaĵojn apud la granda kluzo, kie kuŝas speco da ĝardeno, preskaŭ je la nivelo de la akvo.

La knabo, kiu vane postkuris sian posedaĵon ĝis la barilo, laŭte ploregis kaj la knabino ŝajnis antaŭtimi la riproĉojn ricevotajn ĉe la alveno hejme; la malfeliĉa infanino tordis siajn manojn kaj rigardis malĝojege malsupren.

Oni petis viron, kiu pasigis boaton trans la ponton, ke li ĝin kaptu. Li ne volis. Kiu ja sin okupas pri ĉapo de hebrea infano? Kiu priatentas la ploradon de hebrea knabino?!

Jes, oni priatentas ĝin por havi kialon halti ĉe la bordo de la vojo. Vi scias kiel, en Eŭropaj urboj, oni amasiĝas pro ĉiu malgravaĵo, kiel ĉiu demandas: « Kio estas? » sed neniu iam demandas: « Ĉu mi povas helpi? »

Kiam, kelkajn momentojn plimalfrue, la laste alvenintaj demandis: « Kio okazis? » la respondo estis: « Juna sinjoro malsupren rampis por kapti la ĉapeton de tiu infano ». La juna sinjoro estis mi, kompreneble.

Oni helpis min supreniri pere de ŝnurego, ĉar mi ne povis surrampi la glatan muron. Mi disŝiris miajn vestaĵojn kaj senhaultigis miajn manojn, sed ne sufiĉe, laŭ mia opinio! En mia vivo, mi malofte havis plezuron tian, kian mi ĝuis post mia ago, kiam mi estis denove supre. Mi dezirus posedi mian portreton de tiu momento. Dudek ĝis tridek personoj, ĉiuj malaltrangaj kaj precipe Hebreoj, min aplaudis. Maljunulo, kiu ĵetis al mi la ŝnuregon, premis mian manon dirante: « Junulo, vi sukcesos! » Mia kara Vilĉjo kriis, kvazaŭ li estis fierega: « Li estas mia frato Eduardo! » Kaj mi.....

Abomena vanteco! Mi radiis pro ĝojo. Jes, mi ja estis

feliĉa pro la ĝojo de la infano, kiu estis liberigita de la kolero de la gepatroj; sed tio ne estis la sola kialo, — se nur pro tio mi estus ĝojinta, ĝi parolus pro mia boneco, — sed ne, « mi havis mian rekompencan ». Ĉiuj rigardis min, ĉiuj nomis min, ĉiuj laŭdis min! En tiu momento, tiuj personoj estus obeintaj min, se mi — nur junulo — estis ordoninta ilin. Mi akceptis la antaŭdiraĵon de la maljunulo kiel ion naturan, kaj tiun tutan tagon mi marŝis sur « pligrandigiloj » de mem-estimo, rigardante ĉiun kvazaŭ mi volus diri: « Ĉu vi ne salutas min, mi la . . . . ? »

*El la neerlanda lingvo tradukis*

*Paul Blaise.*

---

## Fajro, akvo kaj honoro.

---

Fajro, Akvo kaj Honoro, oni diras, iam faris interligon. Nu, ĉar Fajro neniam restas en unu loko, kaj Akvo ankaŭ sin movadas, ili decidigis Honoron kunvojaĝi kun ili. Antaŭ ol ekiri, ili konsentis, ke estas necese aranĝi iun signon, per kiu ili povos sin trovi, se okaze ili disiĝus.

Diris Fajro: « Se vi min perdus, memoru, ke kie ajn vi vidos fumon, tie vi nepre min trovos. Tio estas mia signo ».

« Pri mi, — diris Akvo, — se mi malaperus, ne serĉu min kie la tero estas sekega, serĉu min kie vi vidos grandajn salikojn kaj alnojn, verdajn kanojn kaj freŝan herbon. Tie mi ĉiam estos ».

« Miaflanke, — ekkriis Honoro, — atentu, ke vi tenu min ĉiam en la vidkampo, kaj neniam deturnu la okulojn for de mi. Ĉar, eksci, se vi nur unufoje min perdus, vi neniam, dum daŭros la mondo, povos min trovi ».

*(El The Australian Esperantist.)*

*(Bridge str. Benalla (State of Victoria), Australio.)*

---



## HUMORAĴOJ

### **Cu edziĝi ?**

Junulo demandis derviŝon, kion li opinias pri la edziĝo.

— Vidu, respondis la derviŝo, — se vi deziras vivi home kaj morti hunde, ne edziĝu; se vi deziras morti home kaj vivi hunde, tiaokaze edziĝu. (El *Kovna Spegulo*.)

### **Inter brutkomercistoj.**

Iu brutkomercisto telegrafis al sia kolego la jenon: « Zorgu, ke morgaŭ ĉiuj porkoj nepre venu ci-tien kun vi. Mi hodiaŭ ne povas veni al vi, ĉar la hodiaŭa vagonaro ne akceptas bovojn. » (El *Danubo*.)

### **Tombeja surskribo.**

Oni legas sekvantan surskribon sur pordo de tombejo en la ĉirkaŭaĵo de Parizo:

« Tie ĉi oni enterigas nur mortintojn, vivantajn en la paroĥo. » (El *Germana Esperantisto*.)

### **Kompatema homo.**

Ĉe fervoja katastrofo dek kvin homoj mortis, inter kiuj la servisto de unu Anglo, kiu sidis en vagono de unua klaso. Mylord trankvile elmetis la kapon el la fenestro, kaj vidante, ke lia vagono tute ne suferis, li senemocie residiĝis en sian angulon. La kondukto rapide aliras kaj alparolas lin tra la fenestro: « Sinjoro, okazis granda malfeliĉo! » — « O-o! » — « Tri vagonoj estas frakasitaj! » — « O-o! » — « Dek kvin homoj mortis! » — « O-o! » — « Kaj ankaŭ via servisto, sinjoro! » — « O-o! » — « Li estas en ses pecojn disŝirita! » — « O-o! » — « Kion ni devas fari kun li? » — « Nu, alportu tiun pecon de li, kie troviĝas la ŝlosiloj de mia kofro. »

---

## **OUVRAGES de M. Henri de Coppel.**

*En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».*

|  |          |
|--|----------|
| L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons . . . . .  | fr. 1,50 |
| Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de<br>2800 phrases de la vie usuelle . . . . . | fr. 1,80 |
| L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,<br>édition pour tenor ou soprano . . . . .      | fr. 1,50 |

## LI KAJ ŜI

---

Li fajre amegis sian belulinon Manjon. Ŝi lin ne amis. Eĉ pli — ŝi lin malestimis. Li estis alta gracia blondulo kun blujaj, enpensaj, aŭ pli vere, sopiraj okuloj; kun lipoj montrantaj homon pasian, kun forta muskolaro. Ŝi estis de alta kresko, plena, kun belegaj formoj, pasia ne malpli ol li: ŝi fordonadis sin al la unua tiro, al la unua logo. Ŝiaj profundaj, nigraj okuloj tiradis post si amasojn da viroj. Ŝia bela, akre formita roma profilo por unu fojo faladis en la okulojn kaj kontraŭvole restadis en la memoro. Ŝi koketadis per sia tre malgranda, mirinda piedeto.

Entute ĉiuj ŝiaj movoj altiradis per sia natura gracieco. Ŝi estis kreita por venkadi la korojn de viroj. Ŝi amis balon, belegan salonon, plenan de homoj, kie ĉiuj tiel ŝin adoris, tiel ŝin amis.

Ŝi dancadis ĝis plena laceco kaj forveturadis unu el la lastaj. Preskaŭ ĉiuj kavaliroj amasiĝadis apud ŝia kaleŝo. Por la ceteraj sinjorinoj ne restis akompanantoj, kaj tio ĉi faradis al ŝi ĝojon, kvankam ŝi nenion esprimadis, kvazaŭ tiel ĝi devas nature esti.

Li ne amis balojn. Li amis sidi sur la bordo de la maro, kaj aŭskulti la batadon de la ondoj. Eĉ en vintro, kiam lia edzino forveturadis al vespero, li alveturadis en la antaŭurbon kaj piede iradis al la bordo, kaj rigardante la ŝaŭmon, aŭskultante tiun ĉi bruon kaj batadon, li ĉion forgesadis kaj fordonadis sin al la maro. Li komprenis nur unu muzikon, la muzikon de la akvo, kiun li kvazaŭ glutadis per la orelo, pri nenio plu zorgante, kaj li amis la odoron de la mara sablo. La unuan fojon li vidis sian Manjon sur la bordo de la maro kaj ne atendite por si mem ekamis ŝin. Lia amo dividiĝis inter la maro kaj ŝi. En la lasta tago antaŭ la edziĝo li venis kvazaŭ peti pardonon de la maro, kaj la maro bruegis, ŝaŭmis, pelis unu ondon post la alia, kvazaŭ kolerante pro lia perfido.

Li staris honta, pala, kaj nur ripetadis: « Ĉion tion ĉi, mi al ŝi oferas ».

Kaj ŝi respondis per konsento al lia peto de la mano nur tial, ke ŝi bezonis liberecon, kaj pli grandan liberecon,

ol tiu de edzinita virino ne konis, kaj ili edziĝis. Lian amon ŝi respondis komence malvarme, poste tiu ĉi malvarmecco transiris en malamon kaj fine turniĝis en malestimon. Li ne volis tedi al ŝi per siaj karesoj, tio estas pli vera, li ne kuragiĝis, kaj li denove komencis sidadi tutajn horojn apud la maro kaj ŝi flugadis en la ventego de baloj kaj akiradis ĉiam novajn kaj novajn adorantojn. Tiel pasis tri jaroj. Li silente estingiĝadis. Fine, en unu somera varma tago, li matene iris al la maro kaj kuŝis sur la sablo ĝis malfrua vespero.

La unuan fojon en la vivo, la maro lin ne interesis. Li estis okupita je io alia, almenaŭ sur lia vizaĝo ne estis videbla la antaŭa ravata ĝojo: li tute fariĝis iel pala, maldika, flava, liaj okuloj febre brilis. Preskaŭ jam en la nokto li revenis hejmen, kontenta kaj fidema.... En la mateno li jam ne vivis.

.....  
Ŝi ne ploris, ne malĝojis. Lian ĉerkon akompanis kun ŝi ŝia nova elektito.

*M. Solovjev.*

---

---

La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj.  
Fondita en 1895

# LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta post la 15. de ĉiu monato.

Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)

---

## JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto Beletristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj.

Jara abono : 3 fr. (1 Sm. 200)

*Lingvo Internacia kaj Juna Esperantisto* kune :

**7 fr. (2 Sm. 800).**

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.



Vera  
Ferhava Salo  
alsimiligobla

ELTROVITA DE

M. Maurice ROBIN  
en 1894

LA

**Fer Robin**

mirinde efikas

KONTRAŬ

SENSANGECO,  
PALKOLORECO,  
SANGELFLUOJ  
ĈIUSPECAJ

Akoelas la nutraron kaj  
neniam mallaksigas.

Tiu ĉi kuracilo, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉiu mango, ĉu en londa akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn

POSTULU la ROBIN

VENDEJO POGRANDE:

13, Rue de Poissy, PARIS

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : L. DESPRÉS.